Tiu ĉi estas la lasta numero. Dankon pro via partopreno! Ĝis revido!

BALTIAJ ESPERANTO TAGOJ-59 KAUNAS 2025

# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

**n-ro 8** hodiaŭ: 23 °C morgaŭ: 26 °C sabato, la 12-a de julio 2025

## RAPORTOJ

### BET-59 atingas sian finon. Jen kelkaj statistikaĵoj...

Al la ĉi-jara BET aliĝis entute **292 personoj** el **32 landoj**. Dum la **8 tagoj** de la aranĝo okazis **35 prelegoj**, **9 koncertoj**, **4 spektakloj** kaj estis prezentitaj **4 filmoj**. Okazis **30 lecionoj de Esperanto** en **5 lingvoniveloj**, en kiuj diligente lernis **60–70 lernantoj**; krome okazis ankaŭ **5 lecionoj de la litova** por komencantoj. Estis **4 organizitaj ekskursoj**, el kiuj unu tuttaga kaj tri duontagaj, kaj pluraj alternativaj, memorganizitaj ekskurs(et)oj de la partoprenantoj. Aperis **8 numeroj** de *Kunfluo* (sur **32 paĝoj**, kun **pli ol 60 koloraj fotoj**) en la eldonkvanto de **300 ekzempleroj**. Sed la plej kara estas nenombrebla: la etoso!

**Dankon pro via partopreno! Ĝis la sekva BET!**



fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

La lasta tago de **la libroservo**!
10.00 – 12.30 kaj 14.00 – 18.00
en la aŭditorio 107

## HODIAŬA PROGRAMO

| | **Sabato, la 12-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **11.00 – 12.00** | Poezia anguleto: *La sonetoj de Orfeo* de Rainer Maria Rilke. Prezentas prof. Mark Fettes (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Kristin Tytgat: "Diversaj aspektoj de interkultura komunikado" (*aŭditorio 401*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 403*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Aida Čižikaitė: "Litovio dum jarcentoj" (*Senata salono*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Nina Pietuchowska: "Homoj skribas kartetojn, poŝtkartojn, bildkartojn" (*aŭditorio 101*) |
| **12.00 – 13.00** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Lastaj respektoj* (*aŭditorio 401*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | **Solena fermo de BET-59** (*Senata salono*) |
| **16.30 – 17.30** | Kantas Valdas Striužas (*Senata salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Lingva ludo "Komprenu min!" kun Mikaelo Lineckij – granda finalo (*aŭditorio 306*) |
| **19.00 – 21.00** | Adiaŭa vespero (*Senata salono*) |

## MORGAŬA PROGRAMO

| | **Dimanĉo, la 13-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **11.00 – 18.00** | Disveturo |

## PROGRAMŜANĜOJ

· La prezento de la lasta el la filmoj de **Aleksej Salomatov** (*Lastaj respektoj*) estas ŝovita al aŭditorio 401 (hodiaŭ je 15.00).
· La lasta leciono de la kurso pri la litova lingvo, gvidata de **Severija Marija Banaitytė**, okazos en aŭditorio 403 (hodiaŭ je 15.00).

## BET-60 EN 2026


fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

# Venontjare en Latvio

La unua BET okazis antaŭ 66 jaroj apud Rigo, ankaŭ la venontjara, jubilea aranĝo, la 60-a BET okazos en Latvio. Ni planas okazigi ĝin **de la 4-a ĝis la 11-a de julio 2026**.
Ĉar temas pri jubileo, certe ne mankos festa torto. Vin atendas la kutima programo, kiun vi jam bone konas: prelegoj, kurso de la latva lingvo, Somera Universitato kaj riĉa kultura programo. Merkredo estos la ekskursa tago kaj aldone okazos ankaŭ duontagaj ekskursoj. Ni klopodos aranĝi la programon tiel, ke ne okazu samtempe kvin programeroj ☺, tiel ke vi povu partopreni en ĉio, kio interesas vin!
Unu afero, kiun ni ne povas promesi, estas la vetero. Ni tamen traktos kun la superaj fortoj por akiri belan, sunan veteron por la tuta semajno!
La unua bulteno kun informoj pri la loko, kotizoj, loĝigo ktp. estos publikigita antaŭ la jarfino.
Se vi pretas kontribui al la jubilea BET – precipe pri la Somera Universitato kaj kultura programo – viaj proponoj estas bonvenaj ĉe la retadreso margarita.zelve@gmail.com.

**Margarita Želve**
Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio

## KONKLUDE

# La lasta filmoprezento

Hodiaŭ okazos la lasta el la filmoprezentoj de Aleksej Salomatov. Ĉi-foje *Lastaj respektoj* (39 minutoj), kun subtekstoj en Esperanto. **Venu je 12.00 al aŭditorio 401.**

# Granda finalo de la lingva ludo “Komprenu min!”

Hodiaŭ okazos la granda finalo de la lingva ludo kun Mikaelo Lineckij “Komprenu min!” Ni jam povas malkaŝi nomojn de iuj el la ludantoj. La unua teamo konsistos el: **Margarita Želve** kaj **Līga Siliņa**. Venu je 18.30 al aŭditorio 306.

**Mikaelo Lineckij**


fotis **Andrzej Sochacki**

# Oni plu ekskursas

Denove okazis spontanea ekskurso ekster la oficiala programo. Ĉi-foje sub la gvido de **Antanas Visockas** ni iris al la tegmento de la dioceza palaco kaj poste ni vizitis la surtegmentan kafejon *Boheme House*.

**Vladimir Kononiuk**


fotis **Vladimir Kononiuk**

## Prelegoj rete elŝuteblaj

La tekstoj de la prelegoj *Lingvo kaj kulturo* troviĝas en la libroj elŝuteblaj el la retejo de la Interlingvistikaj Studoj (interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/eldonajoj.html), artikolo pri koloroj estos elŝutebla el la IKU-libro.
Pri la interlingvistika fako (5-a prelego) vi trovos prezenton en esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj/, kaj pri Ilona Koutny: esfconnected.org/2025/02/20/ilona-koutny-gvidlumo-en-esperanto-studoj/.

**Ilona Koutny**

## Tim Owen pri Veisiejai

Mi verkis artikolon pri mia pilgrimado en merkredo kun tri aliaj BET-anoj al Veisiejai, vilaĝo en kiu loĝis Ludoviko Zamenhof dum kvar monatoj en 1885. Ĝin eblas legi (kaj fotojn frandi) ĉe timowen.net/vejsejo. **Tim Owen**




Memfoto de Tim Owen en Zamenhof-strato.

## Nevidebla persono

Ni ĝuas belegajn fotojn en la ĉiutaga informilo *Kunfluo*. Tamen, ĉu ĉiu rekonus, kiu kaŝas sin malantaŭ kamerao? Mi "kaptis" lin en loko de la "krimo". Se vi rekonos lin kaj renkontos en koridoro, nepre danku pro liaj kaptitaj kadroj, kiujn ni ĉiuj ĝuas.... **Vida Kulikauskienė**



fotis **Vida Kulikauskienė**

La "nevidebla" Gražvydas Jurgelevičius dum la laboro.

## Plia raporto pri BET-59 en la litovaj amaskomunikiloj

Kultura, historia, socia novaĵretejo Voruta.lt publikigis ampleksan artikolon pri la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj: https://www.voruta.lt/baltijos-esperantininku-dienos-kaune/

## ... kaj en la Esperantaj

Pri BET-59 elsendis **EsperRadio**, inkluzive de registraĵoj de plenaj prelegoj! Konsultu ĉe https://www.youtube.com/@EsperRadio
En la venontaj tagoj sekvos tie pliaj raportoj.

www.facebook.com/esperradio
EsperRadio
ER
La Frateca Radio

Ni atendas ankaŭ raportojn de la aŭstralia radio **3ZZZ**, kies raportisto Franciska Toubale intervjuis plurajn personojn dum la aranĝo.



fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

Alex Humet gvidas kurson je la nivelo C1.

## Diligentaj lernantoj

La ĉiunivelajn lingvokursojn entute vizitadis pli ol 70 personoj. Eĉ se ne ĉiuj venadis ĉiutage pro ekskursoj aŭ similaj aferoj, 60 estis vere diligentaj kaj ricevos atestojn.

**Gražina Opulskienė**
respondeca pri lingvoinstruado

## FOTOJ DE LA TAGO

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



Manfred Westermayer rakontis pri ekologio.



Ite Tytgat prelegis pri la vitaminoj.



Originala prezentaĵo de Mario Migliucci kaj Chiara Raggi.



Registrado de la prezentaĵo.



Publiko sekvas kun intereso.



Granda publiko kaj granda intereso!

### FINANCA SUBTENANTO DE BET-59

iniciatyvos KAUNUI

**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me**
La redakcia retadreso kaj la poŝtelefonaj aplikaĵoj estos malŝaltitaj post la aranĝo. Dankon pro via kunlaboro!

✆ **+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025